# Plaĉa facila rakonto

Ne estas facile trovi verkon, kiun povas ĝue legi komencantoj aŭ progresantaj lernantoj. Tamen la kvanto da rekomendindaj verketoj iom post iom kreskas. Ĉi tiu aldono al la listo estas tre bonvena. Sten Johansson interese kaj distre verkas, uzante nur 552 morfemojn (= radikoj + memstaraj senfinaĵaj vortoj), ĉerpitajn el la plej ofte uzataj oficialaj vortoj laŭ *Baza radikaro oficiala* kaj du aliaj oftec-listoj por novaj legantoj. En ĉapitro 1 uziĝas nur as-formoj de la verboj, en ĉapitro 2 uziĝas ankaŭ os-formoj, kaj en ĉapitro 3 krome is-formoj. U-formoj ekaperas en ĉapitro 4, us-formoj en ĉapitro 5. Participoj ne aperas (escepte de -anto). La lingvuzo estas tipe konversacia.

La rakonto temas pri la aventuroj de du amikoj partoprenantaj en Kultura Esperanto-Festivalo en Svedio: Viktor, juna rusa gitaristo; Kamilo, juna futbalema italo; kaj Gabriella, ĉarma juna svedino. La intrigo estas simpla, sed interesa, sufiĉe por teni la intereson de la legantoj ĝis la fino. Ĉiurilate bona legolibro por personoj pli ol 13-jaraj, utiligebla en kursoj kaj por individua studado.

**Donald Broadribb**

***Sten Johansson: Kion ajn. Eld. Eldona Societo Esperanto, Nagoya, 2002. 64 paĝoj, vinktitaj.***

***Por mendi, vi krozu al la Retbutiko.***

---

*Indekso*
*Aboni al MONATO*
*Flandra Esperanto-Ligo (FEL)*
*Lasta adapto de tiu ĉi paĝo: marto 2004*